TEJO-aktuale: numero 435, 2017-04

**435 | Aprilo 2017**

Ĉu vi ne vidas ĝuste la mesaĝon? Rigardu ĝin en via retumilo.

## Ni realigu la unuan IJK'n en Afriko!

Antaŭ kelkaj monatoj TEJO lanĉis kampanjon **“Ni realigu la unuan IJK'n en Afriko!”** per kiu ĝi celis kolekti rimedojn por propra kontribuo al la projekto **AEJK – afrika-eŭropa junulara kapabligo** kaj por venigi junajn aktivulojn el aliaj afrikaj landoj, kiuj ne partoprenas en la projekto. Danke al malavereco de Esperantistoj TEJO sukcesis kolekti pli ol **21 mil eŭrojn**! Ni ŝatus elkore danki al ĉiuj, kiuj subtenis ĉi tiun iniciaton! Legu pli ĉe nia retpaĝo!

---

## Komunigu viajn ideojn por la strategio de TEJO

TEJO estas en procezo krei novan **strategian laborplanon**, kiu gvidu la agadon de la organizo dum la venontaj jaroj. Pro tio ni tre ŝatus aŭskulti **viajn ideojn** pri kion la monda junulara organizo faru! Por tio disponeblas formularo kaj ni petas bonvole plenigi ĝin. La limdato por kontribuoj estas la **29'a de aprilo**, sed kontribuoj aparte bonvenas ĝis la **15'a de aprilo**!

---

## La granda aventuro kun Inicialoj D.C.

Inicialoj D.C., la plurlingva projekto de **Eric Languillat**, eldonis novan albumon en Januaro, *La granda aventuro*. La brila nova albumo enhavas altkvalitan produktadon, interesajn tekstojn kaj unikan etoson. Ariel trafis la okazon intevuji Eric'on pri la nova albumo kaj sia muzika projekto. Se vi volas legi la **intervujon** trarigardu nian retejon dum se vi emas aŭskulti aŭ aĉeti la **novan albumon** vi povas tion fari per Bandcamp.

---

## Pasporta Servo 2017 oficiale disponeblas!

**Pasporta Servo 2017** oficiale estas en la libroservo de UEA! Se vi estas gasto vi jam tuj povas mendi vian ekzempleron!

Vi ankaŭ povas legi ĉi tie la spertojn de **Anna Lobo de Carvalho** pri la gastiga servo, kiu estas tradicia kultura trajto de Esperanto.

## Venontaj Eventoj dum Aprilo kaj Majo

- 25'an de Aprilo - Limbas festivalo (plurlingvula, inkluzive de la Esperanta, festivalo por Italparolantoj) en Sant'Antioco, Italujo
- 28'an de Aprilo - 4'a Centrejo en Bartošovice, Ĉeĥujo
- 28'an de Aprilo - Krokodila Renkontiĝo 2017 en Arrout, Francujo
- 19'an de Majo - Brita kaj Skota Esperanto-kongreso en Edinburgo, Unuiĝinta Reĝlando

# Imagu la idealan renkontiĝon!

Artista teamo volas fari **artan projekton** pri nia movado: Ili bezonas vian helpon por scii kiel esperantistoj imagas la **perfektan internacian renkontiĝon**. Rakontu al ili, kie vi revus partopreni eo-renkontiĝon kaj kio estus la perfekta kongresa temo. Plenigu simplan demandaron ĉi tie kaj ricevu senpage elektronikan eldonaĵon de la rezulto!

---

# Ni serĉas komisiiton pri Scienca kaj Faka Agado!

Por prizorgi la bezonojn de la junaj Esperanto-parolantoj aktivaj en la scienca kaj faka mondo TEJO serĉas respondeculon por la komisiono pri **Scienca kaj Faka Agado.** Legu detale la alvokon por kunlabori en ĉi tiu grava kampo por la Esperanto-movado, vi havas tempon ĝis la **22'a de aprilo.**

# Sandip kaj la junulara E-movado en Nepalo

La Esperanta movado ĝermas en tiu fama montara lando, legu la intervujon al Sandip Lamichhane pri la stato de la tiea movado .

---

**Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO Aktuale?**

Sendu viajn novaĵojn al tejoaktuale@tejo.org antaŭ la lasta tago de la monato.

Antaŭdankon pro la helpo!

---

## Kolofono

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj

ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Alessandro Bonfanti
**Kontribuantoj de ĉi tiu numero:** Ariel Palmer, Enric Baltasar, Cesco Reale

**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), tejo.org

*Kopirajto © 2017 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno